

# O ESPERANTO COMO REVELAÇÃO

pelo Espírito de

Francisco Valdomiro Lorenz

---

# ESPERANTO KIEL REVELACIO

de la Spirito de

Francisco Valdomiro Lorenz

# I

## Além da Morte

Despertando, fora da roupagem constringente do corpo físico, e sobrepondo-nos à comoção natural do processo liberatório da alma, insopitável anseio de expansão nos excita.

Compelidos a reajustar o quadro informativo das definições teológicas, acordamos e, reconhecendo o impositivo da própria renovação, sonhamos perlustrar os caminhos do mundo. Conhecer, enfim, a Terra! Auscultar-lhe a ancianidade e a grandeza! Penetrar a cultura dos povos e sentir-lhes de perto o conjunto de tradições e lendas, crenças e costumes! Não apenas escutar as palavras que se pronunciam agora nas ruínas de Tebas ou nos templos de Benares, nas ruas de Atenas ou nos santos lugares de Jerusalém, nas relíquias de Roma ou nos campos da França, mas também assinalar, de viva voz, os apontamentos dos arquivistas do espírito, que velam pela sabedoria do Egito e protegem o Mânava Dharma Sastra ou as Leis de Manu da Índia Bramânica, que sustentam os registros das anotações de Sócrates e das lições originais de Jesus, e que nos poderão re-

# I

## Post la Morto

Post kiam mi vekiĝis ekster la strikta vesto el la fizika korpo kaj jam venkis la naturan emocion naskitan de la proceso liberiganta la animon, nebridebla deziro de libereco ekscitis min.

Devigita korekti la informan bildon starigitan de la teologiaj difinoj, mi vekiĝis kaj, akceptante la trudojn de la propra renovigo, mi revis trairi la vojojn de la mondo. Mi revis koni, fine, la Teron! Aŭskulti ĝiajn maljunecon kaj grandecon! Penetri la kulturon de la popoloj kaj proksime senti la tuton de iliaj tradicioj kaj legendoj, kredaĵoj kaj kutimoj! Ne nur aŭskulti la vortojn nun elparolatajn ĉe la ruinoj de Teboj aŭ en la temploj de Benareso, sur la stratoj de Ateno aŭ sur la sanktaj lokoj de Jerusalemo, ĉe la relikvoj de Romo aŭ sur la kampoj de Francujo, sed ankaŭ parole rimarkigi la notojn de la arĥivistoj de la spirito, notojn gardantajn la saĝon de Egiptujo kaj protektantajn la Manava Dharma Sastra-n aŭ la Leĝojn de Manuo el la bramana Hindujo, Leĝojn registrantajn la notojn de Sokrato kaj la originalajn lecionojn de Jesuo, kaj kiuj povos malkaŝi al

velar os editos dos imperadores romanos e repetir as palavras de Vercingétorix, o herói gaulês, quando se rendeu aos soldados de Júlio César para adornar-lhe o triunfo!...

Quem, na euforia do veículo espiritual rarefeito, não aspirará a transportar-se, de surpresa em surpresa, nos domínios da inteligência, como a falena, ébria de liberdade e de luz, volitando de flor em flor?

ni la ediktojn de la Romaj imperiestroj kaj ripeti la parolojn de Vercingetorix, la galla heroo, kapitulacinta al la sodatoj de Julio Cezaro, por ornamati ties triumfon!...

Kiu, dum la eŭforio de maldensigita spirito, ne aspiros transporti sin, de surprizo al surprizo, al la sfero de la intelekto, simile al la faleno ebria de libereco kaj lumo, flirtanta de floro al floro?